

Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto
128
printempo 2022



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

nia federacio sur Facebook

[http://www.facebook.com/
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

prezidanto

Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

aliĝkoto (kun la gazeto)

6 €

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Nicole Lafitte
(ĉe la supra adreso de
Pierre Oliva)

sekretario

redaktoro kaj enpaĝiganto

Pascal Vilain
48 avenue Alexis Godillot
83400 Hyères
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n° **25-a de junio 2022**

bonvolu sendi al la supra retadreso

>>><

antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

Vorto de la prezidanto

Denove, kiel prezidanto de nia federacio, mi pensu kaj esperu, ke la Kovim malaperos!

Laŭ mi, la nunaj optimistaj prognozoj bedaŭrinde estas nuraj diraĵoj, por ke la prezidenta baloto de aprilo 2022 senprobleme okazu, ĉu ne? Ni esperu, ke ĉio poste reiĝu tia, kia estis antaŭ la du epidemijaroj! Mi deziras bonan laboron al vi ĉiuj en viaj kluboj.

Pierre Oliva



enhavo

2	protokolo de la membro-kunveno en Les Issambres	8	Mediterranea Esperanto-Semajno
4	nekrologo Fréjus - Saint-Raphaël	10	paĝo de la komencantoj
5	Hyères kaj Arles	11	Élisée Reclus
6	Printempa Festo de Espéranto-France	12	agendo
7	Lidja Zamenhof	+	reta suplemento pri Reunio

PROCÈS-VERBAL DE L'ASSEMBLÉE GÉNÉRALE D'ESPÉRANTO-PROVENCE dimanche 27 février 2022 aux ISSAMBRES (83) à 14 heures

1 - En l'absence du Président, Pierre Oliva, empêché pour raisons de santé, et du trésorier Nicole Lafitte, c'est le secrétaire, Pascal Vilain, qui ouvre la séance et souhaite la bienvenue aux 19 présents (dont les membres du CA Josiane Moirand, Marc Gallardo, Monique Arnaud et Renée Triolle) et 8 pouvoirs (dont Gilles Wallez et Thierry Spanjaard excusés).

Élection du secrétaire de séance : Renée Triolle



2 - rapport moral (paru dans le bulletin n°127)

Pas de fonctionnement normal en 2020 à cause du COVID, même si certains clubs ont continué par téléphone.

rapport moral 2021 : peu d'activités dans le cadre d'Espéranto-Provence (MES annulé, id. pour le stage du Beausset). Les membres sont âgés, les jeunes s'intéressent à l'espéranto mais ne rejoignent pas l'association.

3 - rapport d'activités

97 membres fin 2021 (dont 15 suite à un rappel téléphonique). Aujourd'hui 54 (dont 18 à Saint-Raphaël). Rappel par Pascal Vilain sur l'avantage de la cotisation groupée (local + fédéral + national) qui permet d'en déduire 66% de ses impôts.

Les clubs disparaissent, faute de moteur : restent Marseille, Fréjus, Le Beausset, Avignon.

Monique Arnaud fait savoir qu'à Gap, le compte courant a été fermé; 241 euros ont été versés sur le compte d'Espéranto-Provence et deviendra un sous-compte car quelques activités continuent : Foire bio à Embrun (cotisation 20 €) ou fête de la Paix.

Antennes à La Ciotat et Hyères.

Les espérantistes provençaux contribuent par de nombreux articles dans les revues en espéranto. Côté culture, notons les films Esku sur Youtube, à l'initiative de Thierry Spanjaard et Pascal Vilain. Contacts avec les médiathèques de Hyères et de Lorgues.

rapport adopté à l'unanimité moins une abstention.

4 - rapport financier

paru dans le bulletin, approuvé à l'unanimité moins une abstention.

5 - projets pour 2022-2023

stage au Beausset fin novembre; MES aux Issambres; plantation d'arbres suite à l'appel de l'ONU, relayé par Universala Esperanto-Asocio.

6 - recrutement

Comment toucher les jeunes, non intéressés par la vie de club, plus sensibles aux réseaux sociaux. L'appli Amikumu est une piste, explorée par Pascal Vilain avec plus ou moins de succès.

Intervention dans les collèges et lycées comme le fait Monique Arnaud à Gap, à partir d'un Power Point d'Anna Lowenstein.

Plaidoyer pour la visioconférence du Service Civil Citoyen et l'emploi de jeunes dans ce cadre: plusieurs problèmes se posent (Philippe Chavignon: c'est une bonne idée, mais il faut construire un projet, trouver un tuteur, donc avoir des forces vives, plus le budget 106 €)

Présenter l'espéranto par la bande, en liant avec les questions qui intéressent les gens, aller sur leur terrain, valoriser ce que les gens font. Commencer par exemple par les questions "Combien de langues parlez-vous ? Combien de langues avez-vous apprises ?"

7 - relations extérieures

Une campagne auprès des députés européens, ouverte à tous les Européens sur l'avenir de l'Europe, a placé en première position la nécessité de plaider pour un meilleur enseignement des langues. Officiellement, chaque Européen doit connaître deux langues, en plus de sa langue maternelle.

On est loin du compte !

UEA lance une campagne que les gens doivent relayer: envoyer aux députés européens une carte postale pour leur demander de s'intéresser à ce problème et peut-être s'engager. La carte postale représente le drapeau de l'UE, la liste des 24 langues officielles de l'UE et une bulle + espéranto. Renée Triolle fera un article pour le site d'Espéranto-Provence avec les références. Urgent : la campagne se termine en mai. Une douzaine de ces cartes est distribuée.

7 - Information interne

Le site fonctionne. Le bulletin, rédigé par Pascal Vilain, paraît 4 fois par an. Pour profiter du tarif d'expédition avantageux, il faut envoyer 100 exemplaires.

Renoncer à la version papier ? La plupart des présents plaident pour la version papier plutôt qu'internet.

Serait-il plus avantageux que chaque club imprime le nombre nécessaire ? Mais garderait-on la même qualité ? Faire un envoi groupé à chaque club ? Le Conseil d'administration discutera et décidera.

Nous remercions Denise Loisel et Simone qui plient et expédient "Espéranto-Provence". Les convocations doivent être expédiées dans un courrier séparé.

Le matériel d'Espéranto-Provence (barnum, drapeaux, documents, revues, rétroprojecteur, etc.) déposé chez Renée Triolle à La Ciotat, est à la disposition de tous. Ainsi que les livres, par exemple ceux donnés par Manosque : vendus lors de rencontres pour un prix dérisoire. Pascal Vilain laisse aux Issambres les livres donnés par les héritiers de Mme Fréjaville.

8- Renouveau du CA

Un seul candidat, Marica Bosnjakovic, des Arcs-sur-Argens, membre du club de Fréjus - Saint-Raphaël, est poussée à faire acte de candidature. Éluë.

9- Réunion du CA

Date à fixer, sans doute en juin.

Invitation à participer au congrès d'Espéranto-France près de Périgeux en mai.

La séance est levée à 15 h 55.

le secrétaire de séance, Renée Triolle

Materialo de la federacio Esperanto-Provence je via dispono

Se vi legas la raportojn de Esperanto-Provence, vi konstatas, ke ni regule investas por prezentmaterialo, aŭ ricevas de malaperintaj grupoj, lasta estas Manosque.


Ni disponas pri:

- > muntebla tendo
- > 4 ŝildoj kun "Esperanto" por pendigi ĉe ĉiuj flankoj
- > ĉareto por ĝin transporti se mankas al vi fortoj
- > afiŝoj
- > flagoj
- > diversaj numeroj de «Le Monde de l'espéranto» aŭ prezento far SAT-amikaro
- > informilo "espéranto, langue équitable", ktp.
- > projekciilo por aŭdvidprezentoj (vi uzu vian komputilon)
- > laŭtparolilo se vi gvidas ekskurson

La materialo troviĝas en La Ciotat, ĉe Renée Triolle sed al membroj de la federacio eblas ĝin prunti.

Do ne hezitu!

Antaŭmendu kaj vizitu: triolle.renee@wanadoo.fr



Nekrologo

Claude Nourmont forpasis la 25-an de februaro 2022

Claude naskiĝis la 23-an de oktobro 1945 en Rouen.

Jam de pli ol 40 jaroj, ŝi loĝis en Luksemburgujo kun sia edzo, la brita esperantisto Brian Moon.

Posedante loĝejon en Aix-en-Provence, Claude estis membro de nia federacio Espéranto-Provence.

Profesie ŝi laboris kiel instruistino.

Inter 1975 kaj 1977, ŝi estis prezidanto de TEJO. Poste ŝi estis elektita ĝia honora prezidanto. Ŝi aktivis ankaŭ por STELO (Studenta Tutmonda Esperanto Ligo).

Dum pluraj jaroj ŝi estis komitatano (C kaj A por Francujo) de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Krome ŝi estis vicprezidanto de tiu institucio de 2004 ĝis 2013 kaj prezidanto de LKK por la Universala Kongreso en Montpellier en 1998.

Ŝi kunlaboris kun pluraj Esperantaj gazetoj. De 2005 ĝis 2022, ŝi respondecis pri la arta rubriko de la revuo «Monato». Ekde 2003 ŝi estis redaktoro de «Le Monde de l'Espéranto», la dulingva gazeto de Espéranto-France. Ŝi ankaŭ kontribuis por la periodaĵo «La Ondo de Esperanto».

En sia nekrologa artikolo, la retejo «Edukado.net» trafe resumis la gravecon de Claude Nourmont por la esperantista komunumo: **“Claude estu modelo por ni pri sindediĉo kaj sindonemo, senlacaj laboregoj por la movado”**.

La federacio Espéranto-Provence sincere kondolencas ŝiajn edzon kaj familianojn.

(parte el la Fejsbuka paĝo «Espéranto Ilustrita»)



83 - Esperanto-Klubo Fréjus - Saint-Raphaël



Ĝenerala membro-kunveno

Ĝi okazis la 2-an de februaro en nia kursejo de la Domo de Asocioj en Saint-Raphaël.

12 membroj ĉeestis, du sendis rajtigilon kaj du senkulpiĝis.

Ni ĉefe parolis pri la okazintaĵoj de la jaro 2021: januara membro-kunveno ĉe Denise Loisel, julia renkontiĝo ĉe Marica kaj Vinko Bosnjakovic, septembraj forumoj de asocioj en Saint-Raphaël kaj Fréjus kaj decembra Zamenhof-tago.

Indas menci, ke ni decidis mondonaci al la Liona lingva kafejo KoToPo.

Ni ankaŭ parolis pri la organizado de la Mediteranea Esperanto-Semajno, kiu feliĉe povis okazi ĉijare.



83 - Espéranto-Hyères

Nia lingva kafejo en Hyères kunigas ĉiumonate lastmerkrede ekde la 17-a, fidelan grupeton da samideanoj.

Dek personoj ĉeestis la februaran kunvenon, la 26-an (nur sep videblaj sur la foto, ĉar jam foriris paro kun juna infano).

Ni eĉ povis esti 11, ĉar ni atendis viziton de juna esperantisto kontaktita pere de Amikumu... sed li atendis antaŭ la pordo de la hotelo dum pli ol tridek minutoj... dum ni atendis lin je la tria kaj lasta hoteletaĝo, kie okazas niaj kunvenoj. Ni eksciis tro malfrue pri tiu bedaŭrinda okazintaĵo!

Ĉu ni vetu, ke ni neniam konatiĝos kun li?

Ba... unu perdita, dek trovotaj, ĉu ne?



La foto povus kredigi, ke ni nur bonetose trinkas kaj manĝas, sed tio kompreneble estas la finfina kunvenparto, post serioza praktikado de nia lingvo.

raportis Pascal V.



13 - Arles

De longe ne plu estas Esperanto-grupo en Arles. Sed tie loĝas membro de nia federacio, Lucas Périer.

Antaŭnelonge okazis interŝanĝo de mesaĝoj inter Lucas, nia federacio kaj esperantistoj el Vercelli, itala urbo ĝemelita kun Arlezo.

Jen eroj el ili:

de Michael Boris Mandirola

La urbo Vercêlo (Vercelli en la itala) alte taksas la ĝemeliĝon kun Arlezo kaj aparte bonus enplektiĝo de esperantistoj en tio; kiel samregionanoj, ĉu vi eble havas kontaktinformojn pri tieaj esperantistoj?

de Lucas Périer

Jes estas ankoraŭ esperantisto en Arlezo, sed nur unu. La kreinto de la ĝemeliĝo kun Verĉelo, Gustave Blary, ne plus vivas; li estis maljuna kiam li mortis antaŭ kelkaj jaroj.

Mi kredas ke mi vidis vin, Michael Boris Mandirola, en Sardujo okaze de la Internacia Junulara Festivalo en aprilo 2014. Mi ja kontentas, ke verŝajne estas esperantisto en la delegitaro kiu volas viziti Arlezon en 2022, kaj mi informas pri tio mian amikon Frederiko, kiu estas la prezidanto de la klubo de Nimo; mi scias ke li strebis por pli bone lernigi Esperanton al mi kaj traduki tekstojn kun mi dum kelkaj jaroj.

de Michael Boris Mandirola

Mi ĝojis ekscii, ke ankoraŭ estas esperantistoj en Arlezo.

Fakte nuntempe ankaŭ mi loĝas en Francujo, pli precize en Tuluzo. Tamen mi serĉis kontaktojn por mia Esperanto-grupo en kiu mi ja plu membras.

Mi aldonas al la mesaĝfadeno nian prezidanton Gianni Reina kaj Emanuele Regano, kiu estas la plej aktiva junulo en la grupo.

de Giovanni Reina, prezidanto de la Verĉela Esperanto-Grupo

Mi legis vian mesaĝon kaj mi esperas ke vi povos reaktivigi en Arlezo la ĝemeliĝon kun Vercelli, helpe de la Arleza Komununo. Fakte la urbo Vercelli ŝategus daŭrigi la ĝemeliĝon per interŝanĝoj de lernantaroj aŭ organizado de kulturaj renkontiĝoj.



daŭrigota?

Pri Esperanto en Arlezo, vi povis legi artikolon je la paĝo 6-a de la numero 104 de Espéranto-Provence, kaj du plenajn paĝojn (8-an kaj 9-an) en la numero 105. Estis informoj pri:

- la vojo "Chemin Docteur Zamenhof"
 - Honoré Bourdelon, iama UEA-delegito
 - Jeanne Calment kaj Esperanto
 - artikolo de "Bulletin des Amis du Viel Arles" pri "Provençal et espéranto"
 - la sola numero de "Tra Provenclando"
- Ambaŭ numeroj, kiel multaj aliaj, estas legeblaj ĉi tie, en nia federacia retejo.*

Printempa Festo de Esperanto-France

Pascal Vilain

Denove Esperanto-France proponis Zoom-kunvenon, la 19-an de marto, kun bunta programo en Esperanto. Okazis mallongaj intervenoj: prezento de spertoj, vojaĝoj, projektoj, libroj, kantoj, filmetoj, novaĵoj de la movado...

Ĉeestis pluraj eksterlandanoj pri diversaj temoj.

Ĉeestis ankaŭ pluraj membroj de nia federacio Esperanto-Provence, kies vizaĝoj kaj nomoj videblis sur la ekrano de Zoom.

Mi prezentis la Jutuban kanalon "EsKu".

Jen ĉi-sube la teksto de mia interveno.

Kio estas EsKu?

Jutuba kanalo, naskiĝinta komence de oktobro 2021.

Kion ĝi celas? Kial dediĉi tempon kaj energion por tia ampleksa projekto?

Ni havas du celojn: unuflanke konigi la historion de nia lingvo kaj movado. Ĝi jam ekzistas en pluraj bonnivelaj verkoj, mi citu i.a. tiujn de Privat, Boulton, Centassi-Masson, Korĵenkov... Sed kelkaj personoj tute ne ŝatas legi, preferante spekti filmojn. Ilin ni celas. Duaflanke, ni volas ke vi konatiĝu kun samideanoj interesaj, aktivaj kaj foje jam ege konataj de ni ĉiuj.

Kies ideo estis? Kiuj iniciatis ĝin?

Estas projekto de Thierry Spanjaard kaj mi mem.

Kie trovi EsKu?

Ĉe Jutubo, tajpante EsKu kaj aldonante la vorton Esperanto, por trafi la bonajn filmetojn.



Kiam aperas nova filmo?

Enjutubiĝas du filmoj ĉiumonate, komence kaj meze de la monato.

Kiom da filmoj aperis?

Jam 13 por la momento.

1 pri enkonduko de la projekto + 6 pri la movad-historio + 6 intervjuoj de esperantistoj.

Sekvos... espereble multaj.

Kiom da abonantoj?

288. Sed mi tute ne dubas pri ampleksa plialtiĝo de ĉi tiu nombro danke al mia nuna prezento!

(293 je la 27-a de marto, kiam mi redaktas ĉi tiun tekston)

Kiel aboni la kanalon?

Estas simplege tion fari.

(Mi aldonas ligilon, por ke vi tuj atingu la taŭgan Jutuban paĝon: [iru ĉi tien](#))

Sub ĉiu filmeto, dekstre, estas butono «Abonu».

Musklatu sur ĝi, kaj jen vi nova abonanto. Pro tio mi jam antaŭdankas vin. Tiel, vi certas, ke vi neniam maltrafos novan epizodon. Ne hezitu reagi... ni atente legos viajn komentojn kaj respondos al viaj demandoj.

Ho, mankas la tabelvorto "Kia"!

Do, kia estas la serio EsKu?

Espereble interesa, kaptiva, instrua... aldonu mem aliajn adjektivojn... nur kondiĉe ke ili estu pozitivaj, ĉu ne?

Kvizo pri Lidja Zamenhof

Aliaj partoj de la Reta Festo konsistis el omaĝo al **Lidja Zamenhof**, pri kiu zorgis Duncan Charters, kaj kvizo pri Lidja, kiun mi verkis pro peto de Bruno Flochon, prezidanto de Espéranto-France.

Se vi ne ĉeestis la Zoom-kunvenon, ankaŭ vi nun povas provi respondi la demandojn. Legu ilin ĉi-sube, kaj proponu viajn respondojn. *(Bonvolu ne tuj legi la sekvan artikolon, ĉar vi povus trovi respondojn al la kvizaj demandoj.)*

A - Kiu estis la familia rilato inter Lidja Zamenhof kaj Ludoviko-Lazaro Zamenhof? Ŝi estis lia...

- 1 - edzino / 2 - patrino
- 3 - filino / 4 - kuzino

B - Lidja iĝis konata instruistino de Esperanto, kiu vojaĝis tra la mondo por doni kursojn. Kiun instru-metodon ŝi kutime uzis?

- 1 - Plenan Lernolibron de la Internacia lingvo, el la Unua Libro
- 2 - Ĉseh-metodon
- 3 - Zagreban metodon
- 4 - Lernolibron «Gerda malaperis»

C – Al kiu religio aniĝis Lidja?

- 1 - katolikismo / 2 - budhismo
- 3 - ortodoksismo / 4 - bahaismo

Ĉ – Kiun Esperantan tradukon de fama romano ni ŝuldas al Lidja?

- 1 - «Quo Vadis», de Henryk Sienkiewicz
- 2 - «Sinjoro Tadeo», de Adam Mickiewicz
- 3 - «La Faraono», de Boleslaw Prus
- 4 - «Marta», de Eliza Orzeszkowa

D – Kie forpasis Lidja?

- 1 – en malsanulejo / 2 – en ekstermejo
- 3 – en sia hejmo / 4 – en maljunulejo

respondoj

A 3 / B 2 / C 4 / Ĉ 1 / D 2



Kiu estis Lidja Zamenhof?



Lidja [Lidia] Zamenhof, la plej juna filino de la iniciatinto de Esperanto, L. L. Zamenhof, naskiĝis la 29-an de januaro 1904 en Varsovio, tiam en la Rusa Imperio.

Ŝi estis agema antaŭeniganto de Esperanto kaj ankaŭ de homaranismo, tipo de religia kaj etika mondcivitaneco formulita fare de ŝia patro.

Ĉirkaŭ 1925, ŝi estiĝis ano de la Baha'a movado. Fine de 1937, ŝi iris al Usono por instrui la Bahaan religion kaj ankaŭ Esperanton. En 1938, pro enmigradaj problemoj en Usono, ŝi devis reiri al Pollando, kie ŝi daŭre instruis kaj ankaŭ tradukis Esperanten multajn Bahaajn verkojn.

Jud-devena, ŝi estis murdita en la germana ekstermejo Treblinka iam post somero 1942.

(2022 estas do la 80-a datreveno de la forpaso de Lidja, pro tio la parolado de Duncan Charters okaze de la Printempa reta festo).

teksto el Vikipedio

se vi volas scii pli pri Lidja Zamenhof, vidu [ĉi tie la tutan Vikipedian artikolon](#)

ndlr: Post la senMESa jaro 2021, pro la KOVIM-krizo, la Mediteranea Esperanto-Semajno povis denove okazi en Les Issambres, de la 26-a de februaro ĝis la 5-a de marto.

Ĝi allogis malpli da homoj ol kutime, pro kompreneblaj kialoj, sed sensurprize disvolviĝis en bonega etoso.

Artikolo aperis en Var-Matin, kaj du partoprenintoj sendis raporton. Eĉ se la enhavo pli malpli samas, mi aperigas la tri tekstojn kun dankoj al la verkintoj.

Est-Var var-matin
Vendredi 4 mars 2022

Retour des Espérantistes aux Issambres

Roquebrune Ils ont pratiqué la langue durant une semaine.



Des Espérantistes heureux de se retrouver pour pratiquer ensemble leur langue universelle. (Photo F. M.)

Une quarantaine de participants sont réunis jusqu'à demain autour d'une même passion à l'hôtel Miléade du Val d'Esquières, aux Issambres. Pendant toute la semaine, ils ont pratiqué au quotidien l'espéranto, grâce au stage organisé chaque année par le Club Espéranto Saint-Raphaël-Fréjus. Suspendue en 2021 pour raisons sanitaires évidentes, cette manifestation accueille habituellement des pratiquants de toute nationalité venus du monde entier. Cette quinzième édition, moins cosmopolite et plus restreinte en nombre, signe le retour enthousiaste des aficionados d'une langue véhiculant des valeurs d'humanisme et de paix, plus essentielles que jamais en ces temps perturbés.

Franchir l'obstacle des langues
Cours d'espéranto le matin, tourisme l'après-midi, les journées des Espérantistes s'achevaient par des projections de films ou documentaires dans cette langue universelle. D'après ses pratiquants, cet idiome créé par le docteur polonais Louis-Lazare Zamenhof, en 1887, s'apprend très rapidement et facilement grâce à une phonétique logique, à la portée de tous. Elle offre par conséquent l'avantage de franchir les frontières et l'obstacle des langues, permettant de correspondre entre différentes nationalités dans quasiment tous les pays du monde. Plus localement, le Club Espéranto Saint-Raphaël-Fréjus dispense gratuitement des cours d'espéranto tous les mercredis à la Maison des associations, à Saint-Raphaël.

FRED M.
Information : 04.94.83.06.88 ou 04.89.99.87.48.

Martine Demouy

Granda ĝojo por ĉiuj revidi unu la alian post du jaroj anstataŭ unu kiel kutime!

Kulpas la pandemio, kiu malebligis iun ajn renkontiĝon dum pluraj monatoj.

Finfine ni kuniĝas, sed mankas multaj: eksterlandanoj, kiuj ne rajtis aŭ timis trapasi la landlimojn kaj aliaj kiuj ne povis montri atestilon pri vakcinado.

Do la kutima grupo el preskaŭ cent homoj reduktiĝis al

kvardek, kaj la lernogrupoj al du, sed tamen je la du plej altaj niveloj (3-a kaj 4-a). La 4-a nivelo estis malpli vizitita ol la 3a, kiel ĉiujare!

La tagoj estis dividitaj inter kursoj, promenadoj, ekskursoj, kantado...

Precipe merkredon estis organizita komentita ŝipekskurso al Saint-Tropez. Ni povis ekvidi la palacojn de kelkaj riĉuloj el diversaj landoj.

En Saint-Tropez ni povis elekti viziti la muzeon aŭ grimpi ĝis la citadelo.

Vendredon vespere okazis festo. La du grupoj interpretis skeĉojn kaj kelkaj kantis du ĥoraĵojn, inter alie ukrainan popolkanton. Aldoniĝis legado de du poemoj pri paco kaj migrantoj. Ŝercoj kaj limerikoj ne mankis!



*meze: Paulo, el Hispanio,
kiu verkis la suban raporton.*

Paulo Meliz

De la 26-a de februaro ĝis la 5-a de marto okazis kongreso-renkonto de Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres, apud la marbordo. Ni, esperantistoj, alvenis akurate, kaj sopirante ĉi tiun kongreson. Ni ja ne povis ĝui ĝin pasintan jaron, pro pandemio, sed ĉijare malfermiĝis nia pordo kaj kvar dekoj da esperantistoj, preskaŭ ĉiuj francoj, krom kvar belgoj kaj unu hispano, preparis sian valizon aŭ tornistrion por ekvojaĝi tien.

La kongreso okazis en nia, de kelkaj jaroj, kutima hotelo; ĉijare ŝanĝiĝis la mastroj, sed la etoso, servoj, estis tre similaj al la ĉiamaj.

Sabaton 26an, je la 16-a, komenciĝis la akcepto en la hotelo.

Nia programo estis la sama kiel tiu de ĉiuj jaroj.

Ĉiutage okazis du malsamaj kursoj. La horaro matene estis du klasperiodoj kun paŭzo por kafumi, danke al la afableco de Monique kaj Simone, poste tagmanĝo kun liberaj posttagmezoj ĝis la 18-a. Tiam denove klasperiodo sekvata de vespermanĝo. Dum vesperoj ni ĝuis interesajn prelegojn de kelkaj partoprenantoj.

Dum la staĝo okazis du kursoj: debatoj kaj gramatiko, kun Kristin Tytgat, kaj alia pri literaturo de Esperanto kaj analizo, kun Anne Jausions. Ambaŭ kursoj estis tiel interese, ke kelkaj partoprenantoj partoprenis ambaŭ kursojn, disdividante la tempon.

Vesperaj prelegoj, proponitaj de partoprenantoj mem, estis bone prezentitaj kaj preskaŭ ĉiuj staĝantoj ĉeestis.

Kaj finfine estis teatrale interpretita noveleto de Sten Johansson, kiun ni titolis «La onta bebo».

La kutima loterio proponita de Monique kaj Simone estis sukcesa.

Ĉiuj pasigis agrablan vesperon kaj esperas partopreni la sekvontan MES en 2023.



la luksa MES-ejo

Ni povis lerni pri Japanio, limerikoj, Belorusio, personaj spertoj kaj vojaĝoj.

Sabaton la 26-an okazis Interkona Vespere, kiel ĉiujare, kaj vendredon la 4-an okazis la Adiaŭa Vespere, tradicia nokto dum kiu multaj partoprenantoj ludis rolon per teatraĵetoj, deklamado de poemoj, spritaĵoj, kaj nia tradicia koruso kantis ĉefverkojn, gvidita de sia reĝisoro Bernard.

Posttagmeze, eblis ripozi aŭ ekskursi. Eblis viziti la urbojn Fréjus kaj Saint-Raphaël. Per ŝipo ni ankaŭ veturis de Sainte-Maxime al Saint-Tropez, ĝuante la marvojaĝon, dum bela vetero akompanis nin. Ni vizitis Saint-Tropez promenante kaj eblis viziti la muzeon «L'Annonciade» pri artistoj, kiuj pentris en Saint-Tropez, kaj pri la komenco de la impresionismo. Ni poste revenis al Sainte-Maxime, urbo tute apuda al Les Issambres. Kiel en la pasintaj jaroj, ni ankaŭ ekskursis en naturo apuda, kaj ni iris al arbaro de mimozarboj, kun multaj korkokverkaj arboj; ĉi tiun promenadon tre ĝuis la partoprenantoj.

Tiuj kiuj ripozis en hotelo anstataŭ ekskursi povis ĉiutage partopreni programon de la hotelo mem, aŭ kafumi, tabloludi, babil...

Sabaton la 5-an, tagmeze finiĝis la kongreso, kaj multaj jam komencis la rehejmiĝon, aliaj ankoraŭ restis plian tagon kaj ĝuis la etoson kaj amikecon de regionaj esperantistoj.

Paĝo de la komencantoj

teksto en facila Esperanto

Iam, en vilaĝo, maljunulo renkontis vojaĝanton.

Tiu salutis lin kaj demandis:

- Kiom da tempo mi bezonos por atingi la plej proksiman urbon?

- Iru! respondis la maljunulo.

- Mi bone scias, ke mi devas iri por atingi la urbon, sed diru al mi, kiom da horoj mi bezonos.

- Iru! ripetis al li la maljunulo.

- Mi konstatas, ke li estas malsaĝulo; mi ne plu demandos lin, diris murmure la vojaĝanto, kaj li ekiris.

Post iom da tempo, la maljunulo ekkriis:

- He, haltu... aŭskultu... vi atingos la urbon post du horoj.

La vojaĝanto haltis kaj demandis, kiel li nun scias, ke li bezonos du horojn.*

- Ĉar mi ne povis tion diri antaŭ ol vidi, kiel rapide vi iras.

klarigo

* Dans le n° 102 (automne 2015 - à voir sur le site Espéranto-Provence), un article pour les débutants, en page 7, parle de la concordance des temps en espéranto.

Il y est écrit : "en espéranto, pas de différence des temps entre le style direct et le style indirect (*contrairement au français*), ce qui est plus logique."

Un exemple est donné dans le texte ci-dessus :

français :

style indirect : Le voyageur **demande** comment il **savait** qu'il lui **faudrait** deux heures.

style direct : Le voyageur **demande** : "Comment **savez-vous** qu'il me **faudra** deux heures ?"

espéranto :

style indirect : La vojaĝanto **demandis**, kiel li nun **scias**, ke li **bezonos** du horojn.

style direct : "La vojaĝanto **demandis**: Kiel vi nun **scias**, ke mi **bezonos** du horojn?"

constat : mêmes temps utilisés aux styles indirect et direct en espéranto.



Plurelekta demandaro

laŭ verkoj de Robert Llorens
eldonitaj de *Espéranto-Info*

1 - gramatika

a) Diru la veron via patro pri via lerneja laboro.

1 - al ; 2 - pri ; 3 - de

b) Pardonu al la aliaj tion kio oni pardonis vin.

1 - al ; 2 - pri ; 3 - de

c) Mi revenos la de oktobro.

1 - dudek ; 2 - dudeka ; 3 - dudekan

2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "bosketo", "bukedo" aŭ "parfumo" por traduki la francan "bouquet"

1 - de fleurs :

2 - d'arbres :

3 - de vin :

d) elektu "borso", "monujo" aŭ "stipendio" por traduki la francan "bourse"

1 - porte-monnaie :

2 - édifice financier :

3 - bourse d'études :



Superzam'

proponita de
Jean-François Cousineau

1. Kie okazis la 1a Afrika Universala Kongreso?

a- Abiĝano b- Kairo c- nenie

2. Kiu verkis la romanon "Viktimoj" en 1925?

a- Auld b- Kalocsay c- Baghy

3. Kiu estas la bardo sen barbo?

a- Handzlik b- Jomo c- Yvart

4. Kio estis la antaŭnomo de la patrino de Zamenhof?

a- Maria b- Rozalia c- Fania

5. Kiu frazo ne taŭgas?

a- kulpas sia frato b- kulpas lia frato

c- kulpas ŝia frato

6. Kiu estas la plej loĝata lando en Eŭropo (2014)?

a- Germanio b- Francio c- Britio

Plurelekta demandaro

1 - gramatika

a: 3 ; b: 1 ; c: 2

2 - vorto-trezora

ĉ1: besto ; ĉ2: bruto ; ĉ3: stultulo

d1: bloko ; d2: ŝtipo ; d3: maso

Solvoj de la demandoj en EP 126 aŭtuno 2021

Superzam'

1 b > 1997 ; 2 a > Grabowski

3 c > Ansero-vanelo

4 c > Sofer ; 5 a > i

6 c > Ukrainio (603 500 km²)

ZEO-oj en Regiono "SUD / PACA" > 13 - Menton (06) - kie ne estas vera ZEO!

Post **Marseille**, pri kies ZEO vi povis legi en la numeroj 126-a kaj 127-a, kaj antaŭ **Montboucher-sur-Jabron** (26), kiu ankaŭ posedas ZEO-n, jen **Menton**, laŭ la alfabeto ordo .

ZEO en Menton? Ne serĉu, vi trovos neniujn straton, sakstraton, avenuon, bulvardon, placon, parkon... kies nomo estas ĉu Zamenhof ĉu Esperanto.

Kial tamen paroli pri Menton?

Ĉar en tiu urbo estas fama ĝardeno: "**Jardin Élisée Reclus**". La antaŭa nomo de la ĝardeno estis "Jardin du Borrigo", sed la urba konsilantaro decidis doni la nomon de Reclus, la 18-an de februaro 1927.

Kial tiu decido?

"Le jardin du Borrigo s'appellera désormais jardin Élisée Reclus pour rendre hommage à celui qui, le premier, a dit que Menton était la perle de la France, et qui a tant contribué à sa renommée mondiale."

Élisée Reclus ja skribis en sia "Géographie Universelle" (19 volumoj - 1876-1894): "*Menton, bâtie au bord de la charmante sinuosité de la mer, dite Golfe de la Paix, est une ville importante, non moins célèbre que Nice comme station hivernale : c'est la perle de la France !*"

Kiu estis Élisée Reclus?

Élisée Reclus, de son nom complet Jacques Élisée Reclus, né le 15 mars 1830 à Sainte-Foy-la-Grande (Gironde) et mort à Thourout en Belgique le 4 juillet 1905, est un géographe et militant anarchiste français. Communard, théoricien anarchiste, c'est un pédagogue et un écrivain prolifique. Membre de la Première Internationale, il rejoint la Fédération jurassienne après l'exclusion de Michel Bakounine. Avec Pierre Kropotkine et Jean Grave, il participe au journal Le Révolté.

En octobre 1894, avec d'autres professeurs démissionnaires, il crée à Bruxelles l'Université nouvelle.

Citoyen du monde avant l'heure, précurseur de la géographie sociale, de la géopolitique, de la géohistoire et de l'écologie, il était également végétarien, naturiste, partisan de l'union libre et espérantiste.

Ses ouvrages majeurs sont La Terre en 2 volumes, sa Géographie universelle en 19 volumes, L'Homme et la Terre en 6 volumes, ainsi que Histoire d'un ruisseau et Histoire d'une montagne. Penseur vivant de ses écrits, il publie également près de 200 articles géographiques, 40 articles sur des thèmes divers et 80 articles politiques dans des périodiques anarchistes.

fonto : [Wikipédia eblas legi la tutan paĝon ĉi tie](#)



Élisée Reclus kaj Esperanto

"Espérantiste", asertas la artikolo de Wikipédia pri Reclus. Li verŝajne pli subtenis ol parolis nian lingvon. Jen eltiraĵoj el lia verko "L'Homme et la Terre (vol. VI)

"Les progrès de l'espéranto sont rapides, et l'idiome pénètre peut-être plus dans les masses populaires que parmi les classes supérieures, dites intelligentes.

C'est, d'un côté, que le sentiment de fraternité internationale a sa part dans le désir d'employer une langue commune, sentiment qui se rencontre surtout chez les travailleurs socialistes, hostiles à toute idée de guerre, et, de l'autre, que l'espéranto, plus facile à apprendre que n'importe quelle autre langue, s'offre de prime abord aux travailleurs ayant peu de loisirs pour leurs études.

[...]

L'inventeur de l'espéranto et ceux qui, dans tous les pays du monde, lui ont donné un énergique appui, ne professent nullement l'ambition de remplacer les langues actuelles, avec leur long et si beau passé de littérature et de philosophie ; ils proposent leur appareil d'entente commune entre les nations comme un simple auxiliaire des parlars nationaux."



À noter sur votre agenda

ndlr : Dans les nos 121 à 127, il était écrit ici-même que la crise sanitaire était toujours d'actualité et qu'il ne fallait pas écarter la possibilité d'une nouvelle vague d'attaque virale accompagnée d'une période de restrictions de déplacement. Eh bien... il y a du changement ! Plus de masque obligatoire, plus de passeport sanitaire ou vaccinal. Tout va donc mieux ? Euh... dans le Var, mon département, le taux d'incidence est aujourd'hui, fin mars 2022, de 900 (en 2020, le seuil acceptable devait être inférieur ou égal à... 50!). Mais ne faisons pas la fine bouche : s'il est de nouveau possible de participer à des réunions de clubs, des rencontres, des stages, des congrès, nous n'allons pas nous en priver, n'est-ce pas ?

dans notre fédération

1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille

Café linguistique - Brasserie Les Danaïdes
4 square Stalingrad, 13001 Marseille

dernier mercredi de chaque mois - 17 h - Hyères

Café linguistique - bar de l'hôtel Ibis-Gare
45 rue Edith Cavell (face à la gare)

juin 19 - Barbentane (13) - lieu à confirmer : pique-nique organisé par Espéranto-Avignon
infos : espero84@aol.com

en France

Baugé (49) - Château de Grésillon

avril 22-30 - 11e PRINTEMPaS : cours intensifs, conclus si vous le souhaitez par un examen international.

mai 4-9 - Rencontre chorale d'Interkant et fête du 70e anniversaire de Grésillon.

<http://gresillon.org/?lang=fr>

Bouresse (86) - Kvinpetalo

juin 20-24 - Promenade dans la nature et Wikipedia

<http://www.kvinpetalo.org/?lang=fr>

mai 26-29 - Trélissac (près de Périgueux)

Congrès national annuel d'Espéranto-France

<https://esperanto-france.org/congres-esperanto-france-2022>

en Europe

avril 22-24 - Grande-Bretagne. Congrès britannique à Llandudno Junction, station balnéaire du Pays de Galles.

<https://britakongreso.org/>

mai 21 - Amsterdam (Pays-Bas) - Congrès annuel d'Espéranto-Nederland

<https://eventaservo.org/e/5f5fc5>

ailleurs dans le monde

juillet 30 / août 5 - Moscou (Russie) - le 95e congrès de l'Association mondiale anationale SAT est annulé - peut-être congrès virtuel (à confirmer)

juillet 30 / août 6 - Québec (Canada) - 55e congrès de la Ligue internationale des enseignants d'espéranto (ILEI)

<https://2022.kongreso.org>

août 6-13 - Montréal (Canada)

107ème Congrès universel d'UEA

<https://esperanto2022.ca/fr/accueil>

août 20-27 - Westelbeers

(près d'Eindhoven - Pays-Bas)

78e congrès international de la Jeunesse

<https://ijk2022.tejo.org/>

Vous trouverez aussi la liste de nombreux événements, virtuels ou réels, sur le très bon site:

[eventa servo](http://eventa.servo)

Datreveno

Serĉante iaman artikolon mian por la "paĝo de la komencantoj", kiun mi trovis en la n° 102 de aŭtuno 2015, mi subite konsciis, ke rapidegas la tempo!

Mi ekredaktis nian gazeton "Espéranto-Provence" en vintro 2011/2012, t.e. - jes ja! - antaŭ 10 jaroj.

Tio signifas, ke mi redaktis 40 numerojn, de la 87-a al la 127-a.

Eĉ 41, ĉar la nuna, kiun vi legas, estas la 128-a.

Ĉu atendas min 10 pliaj laborjaroj kaj 40 pliaj redaktotaj gazetoj?

Nu... tio dependos de miaj emo, entuziasmo, energio, sanstato...

Mi pretas tion fari... sed se iu ŝatus repreni la torĉon... mi certe ne rifuzus doni ĝin...

Pascal Vilain

(ĉar oni neniam estas pli bone servita ol de si mem 😊)

Petrolŝipo ŝiprompiĝis ĉe la marbordo de Reunio.



La dek unu ŝipanoj de la Maŭrcia petrolŝipo, Trista Star, pli kaj pli malfacile regis la manovrojn. La veterkondiĉoj estis tiel teruraj pro la ciklono Batsirai: ventego de forteco 10 kaj ondegoj ĝis 12 metroj altaj! La maristoj decidis lanĉi signalojn de senhelpeco. Sed la apudmara helpo ne povis sufiĉe rapide interveni. Sekve, la Trista Star devojiĝis kaj grundis ĉe la suda marbordo de nia insulo je la 3a de februaro. Ĝis nun ĝi ankoraŭ troviĝas tie.

Hura! Oni savis la tutan skipon. Neniu estis vundita.

Feliĉe ke la ŝipo marveturis malplena. Oni evitis grandan katastrofon, riskon de poluado. Imagu petrolon sur la plaĝoj!

La petrolŝipo atendas decidon, ĉar ĝi ne plu kapblas navigi pro breĉo de 3 metroj en la maŝinejo.

Ĉu trenŝipo remorkos ĝin aŭ ...?

